

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 3106 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Aprilo 1929

ON TRANSLATION.

In "A Conversation with an Angel and Other Essays" Hilaire Belloc writes:—"Throughout the Occident there are no less than five quite separate major idioms, which five major idioms have attached to them at least one hundred minor ones. No man, not the most cultured and travelled man, possesses fully these five idioms. A very few men may claim to three; a few thousand (out of many millions) to two . . . For instance, I can make my way with difficulty through an Italian or Spanish newspaper. I cannot do this with a German newspaper. I can read a French newspaper, not well, as though it were English, but still with a fairly full comprehension. When it comes to the literatures of these countries, say the ordinary novel, I cannot read German at all, nor, with any ease, Italian, nor, save at three-quarters guesswork, the Castilian; when it comes to great literature, and an immediate feeling of excellence through reading, I am no use at all, except in English. Though I have a wide current acquaintance with French I could never be sure of my judgment as to a French piece of verse, still less as to French prose. In my acquaintance I count highly-cultivated men—perhaps a dozen of them—with a full judgment of two or even three idioms foreign to my own; but I have, in the whole course of a life which has brought me up against a great many other men, only

known two who were even generally acquainted with the five idioms; not one who was at home in all." Elsewhere, in warning he tells us that those "very insufficient people who imagine for the moment that English will become a universal medium for the white civilisation must admit that its wide spreading has had a most lamentable effect upon its quality."

He concludes that "great translation needs exceptional talent, desiring to reproduce, and able to reproduce, the spiritual rhythm, the character, the essence of the original thing," and refers to newspaper translation as an "appalling misrepresentation of national feelings abroad which is a curse to our modern press."

After treating the manifold and subtle difficulties that attend the work of translating from one national tongue into another, among which are the different thought-associations and overlapping of meaning in words believed to be equivalents (e.g. rue and street), the "lack of exact correspondence between individual words in two different languages, the different trick of thought in two civilisations, by which what is rhetorical in the one, for instance, may seem plain prose in the other, or by which the order of thought in the one turns chaotic in the other, conceptions in the one not occurring at all in the other (for instance, the French words *constater*, *droit*, *directive*; the English words *gentleman*, *scholar*, *fun*), and so forth." Belloc asks what economic basis there is for the pro-

duction of sound translations, and answers, a payable demand for such or an endowment by a rich man or the State. That the five major idioms must be indifferently translated because of the lack of cash and competency gives little hope to the literati and scientists of the one hundred minor idioms that go to make up the Babel of western Europe. And their viewpoint was not considered or even acknowledged by the essayist. Further, it could hardly have been Mr. Belloc's ignorance of the claims and successes of Esperanto that prompted him to complete the writing without any reference to that language.

—(Robo.)

AN AUSTRALIAN ABROAD.

The following extracts are from a letter to the local Esperanto "consul" written from Vienna by an ex-resident of Mitcham, who, having planned a tour of the old world, learned Esperanto to try out its pretensions to be a means of inter-comprehension.

"For eight months I have been wandering about Europe—Holland, Belgium, France, Germany, Austria—during which time I have proved to my satisfaction that Esperanto is a reality and that in Europe are a great many people whose desire it is to exchange thoughts and aspirations with foreigners. For years before I came to the Continent I felt the impulse to get in personal contact with men of other tongues, but for the Australian, particularly, how many barriers have to be overthrown before that wish can be met.

"Well, why not do the next best thing, and correspond by means of Esperanto? For example, in the quiet little town of Ausbach, in Southern Germany, I met a charming young woman who, while showing me her array of presents and photographs received from all corners of the world, told me that scarcely a day passes without at least one letter arriving for her in Esperanto. For anyone who can travel abroad this language will open the way. Experience warrants my believing that one would find Esperantists scattered everywhere in Europe.

"By the way, one of my English correspondents informed me that he heard you giving a talk from 3LO, in which you mentioned having received a former letter from me. Every success."

LA REVANCHE (REVENGO).

El "Castro's last Sacrament" de Albert Dorrington).

Rado grincanta en sulko vekis Carnac el lia letargio. Li trene paŝis al la pordo kaj scivole rigardis sur la malaltan terenon, kiu sidis inter la biendomo kaj la malgranda sovaĝeja urbeto. La veturilo skue iris tondrete trans mallarĝan ponton super disstaranta fendo en la bazalta deklivo, kaj la eĥoj forte pensigis Carnac pri la sonoj de paflegaj radoj. Ekbruliginte alumeton li glitkurigis siajn tremantajn fingrojn laŭlonge sur breto en postparta angulo de la ĉambro. Helene jam antaŭe metis tie kandelon.

Kiel la vesperoj ĉiam trafis lin surprize! Ŝajnis al li, ke pasis nur momenteto de kiam Helene saltete kuris el tiu ĉambro kun la granda sunĉapelo svinge pendanta ĉe ŝia brako. Carnac ankoraŭ ne povis alkitimiĝi al la sunsubiroj de Aŭstralio. Kun la rapideco de elspiro la mallumo frapis la homojn. Froste li tremis starante en la pordenirejo; la vento de sur la montoj mordis ĝis en liaj ostoj.

"Helene, Helene!" Paŝinte sur la malsekan herbon li vokis nelaŭte. Nenia respondo — nenia sono krom nur tiu de la paflegaj radoj, kies eĥoj ankoraŭ resonis el la valetoj ĝis la sabloŝtonaj altoj.

Malsupre de lia staris la malluma vinbergardeno, kie laboris Kellerman. La nemultaj lanternoj de la malproksima urbeto trembrilis kiel cirklo el juveloj; neforta lumajo en la orientita ĉielo argentis la grize-tegmentan domon transe de la ebenaĵo; hundo minace bojis dum la eĥoj de la paflegaj radoj krakadis de altaĵo ĝis altaĵo.

"Helene, Helene!" Li plende batis per la piedo sur al grundon kaj kolere palpebrumante skuis la pugnon al la vojo kondukanta al la bieno de Brougard. Kiel ŝi estas malfrue! Kiel senĝoja, soleca ŝajnas la domo, kiam ŝia babilanta voĉeto malestas! Ja neniam plu li ŝin permesos foriri post vesperigo.

La malsekaĵo el la tero, ĉe la gutejoj falantaj de la arboj, kvazaŭ ferdente tenegis liajn ostojn. Jam laste tempe li komencis malami la landon, kiu tiele ŝvitigis lian korpon de mateno ĝis nokto, la senindulgan sunon, kaj la frostojn venadantajn kun diabla akurateco por prirabi al li la



frukton de lia laboro. Malsaĝe li agis, formigrante de la trunkvila valo de la rivero Rodano (Rhône)! Ho tiu malbambinda milito de 1870!

El la mallumo de la vinbergardeno ŝvelis al li ondo de sono — subite, klare, vibrante kun fortpulma fervoro. Carnac sin trenis laŭ la vibruje flankita vojstreko kaj aŭskultis. Strio da lumo el la kabano iluminis Kellerman kantantan kaj fingre elektantan pri vinberoj sur la planko. Carnac palpire alproksimiĝis, kaj la antaŭlonjara sabrovundo ĉe la kokso elpuŝigis krion el la lipoj; Kellerman povus tion aŭdi, se li ne ĝuste tiam kantus tranaze:—

Lieb Vaterland, magst ruhig sein!

Lieb Vaterland, magst ruhig sein!

Fest steht und treu

Die Wacht, die Wacht am Rhein!

Carnac ŝtopis la orelojn, kaj kaŝe reiris la domon. Antaŭ tri monatoj venis al li Kellerman kun vundfrotoj piedoj kaj laboron peteganta. Kellerman estis vinbergardenisto ja Germana, sed Carnac, la kosmopolitulo, provis lin je tasko, kaj la vino de ĉi tiu farita egalas la propran. Iom post iom la simplanima Kellerman rakontis sian vivhistorion — la milito de 1870-71 — kun ruĝigoj pro fiero, kion ankoraŭ li ne povis kaŝi. Interŝange Carnac nenion diris; sed tie, en la Aŭstralia sovaĝejo, Sedan-batalo revenis en lian imagon — la amaso da venkitaj leonoj ruzlogitaj en kavon kaj tie buĉitaj de Germanaj matematikistoj.

“Der Deutsche bieder, fromm und stark,” kantis Kellerman. Carnac ronde turniĝis sur la vojo, kaj la sango alsaltis lian aŭskultantan vizaĝon. Subite perlis malsekaĵo sur lia frunto; la terura doloro ĉe la kokso alportis kun si la memoron de certa ulano, kaj de sabrotranĉo mandorse donita sub la fumantaj kahonoj de Moltke. La sabristo kaj Kellerman estis samlandanoj; eble ili parencis. Kellerman ja batalis ĉe Sedan en la fronta linio de ulanoj; povus ja esti, ke Kellerman mem estis la sabristo.

Carnac iris falete tra la longa herbo, kaj la ŝvito gutis de lia vizaĝo sur la manumon. Atinginte la domon, li enmanigis al si brile poluritan sabron, akraklinga ĝi estis, kaj de post Sedan ĝi ne entranciis karnon. Nenia sono en la domo; jam de vesperigo Helene forestis. Al najbaro Brougaud ŝi iris por ludi kun ties infanoj; bone estis, ke Helene havas kunetulojn ĉirkaŭ ŝi! Ŝi intencis resti tie ĝis la deka horo, kiel

ĉiam! Ja bone!

Lia dolore tordata korpo tremetis; li svingegis la brakon dekstren-maldekstren ĝis la sabro fajfis post liaj oreloj. Helene eble sentus la males-ton de Kellerman; sed li povus diri ŝin, ke Kellerman jam foriris okcidenten, kaj baldaŭ ŝi lin forgesus.

Okaza puŝo de vento ĵus blovmalfermis la kabanpordon; la strio jam grandigis en blankan radion kontraste kun la mallumo, kaj la nuko de Kellerman movetadis en ĝi, flanken-antaŭen takte kun la malrapida ritmo de lia ofendega himno. La nuko allogis Carnac. — Ĝi estis tiele karnoriĉa, tiele tendenoplana, rondkurba, kaj atingebla en nur malpli ol brakstreĉo de la pordejo: Carnac bone scipovis sabrobaton taŭgan por mallargaj spacoj — kurbe-brakan tranĉon, kiu saltigus la dekoligitan kapbulbon en la vintonon.

El la apudaj montoj sovaĝa dingo (canis dingo) hurlis, kaj en la sekvinta silenteco Carnac aŭdis la ŝtonojn bruste ruliĝantajn en la perpluve sveliĝinta rivereto malsupre.

Kellerman estis parolanta — ŝajne al si — kaj la voĉo estis mola, tre dolĉa. Carnac ŝteliris pli proksimen ĝis lia torpedosimila barbo frotis la pordon. La nuko de Kellerman denove svingis en la lumon, sed io jam ĝin ĉirkaŭvolvis, io blanka kaj kavet-hava, kiel infana brako. Kellerman ree parolis. “Vi enrampas, enrampas, ĉi tien, kaj vi, kiel eta fantomo, min teruras. Kie vi iris, Helene?” Lia giganta korpo fervore leviĝis super tiun de la knabineto, dum ŝi flustre klarigis, ke patrino Bougaud estis instruanta sin kudri.

Sidanta sur la vinberuje kovrita benko, ŝi klinetis dormeme la kapon, kaj Kellerman ridis al ŝi per sia forta baso, “Himmel! Mi pensas, ke mi mortus en ĉi sovaĝejo, se vi ne ekzistus, Helene. Mi pensas, ke mi mortus!”

Enbrakiginte la infanon li sidmetis ŝin sur la ŝultron. “Mia laboro estas jam finita, Helene; ni iru al via patro.” Ŝia maneto fide enŝoviĝis en lian sunbruligitan pugnon. Preninte pipon de breto li marŝis supren laŭ la malbrua vojstreko sub senmovaj branĉoj de eŭkaliptoj elbarantaj la lumon de duone leviĝinta luno. Helene ridis ĝis tio, ke ŝiaj longaj bukloj skue envolvis lin kiel fumringoj. Ŝia repanta voĉeto kunkantis kun lia profunda baso:—Die Wacht, die Wacht am Rhein!

Carnac retroŝteliris, nur malforte povante stari. Io klake falis sur la stonojn; li kliniĝis, kaj sur la sabron gutis liaj brogantaj larmoj.

(El la Angla trad. Robo)

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.)

Interesatoj turnu sin al Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Victoria, E10.

TRADUKO 11.

NESCIO DE FREMDAJ LINGVOJ de Profesoro Jespersion.

La verkoj de Kant unue konatiĝis en Edinburgh en la jaro mil-okcent-tria, ne en la Germana originalo sed per Francaj tradukoj. John Stuart Mill nur malfacile povis legi la Germanan kaj plivole legadis (2) tradukojn. Li neniam sufiĉe bone lernis la lingvon por kompreni (3) sin en Germana stacidomo. Kiam Carlyle renkontiĝis kun Louis Blanc "estis treege amuze aŭskulti la interparoladon." La Franca lingvo kiel parolis ĝin Carlyle estis laŭvorta tradukado de lia propra netradukebla Anglaĵo, kiun li elparolis per Skota prononco. Louis Blanc tute ne povis kompreni lin, sed atente aŭskultis (4) kaj tre maltrafe respondis (11) (Car. Fox). Faraday havis nenian scion de la Germana lingvo, kaj pro tio la esploroj de Robert Meyer kaj Helmholtz estis por li "sigelita libro." "Kiel alie — diris dekanano Stanley — "povus esti ĉe (5) la Eklezio de Anglujo, se Newman estus povinta legi la Germanan." Kiam Germana klerulo sendis prinotitan eldonon de "Macbeth" al doktoro Furnival, la direktoro de New Shakespeare Society (nova Shakespeare'a societo), Early English Text Society (societo por frutempaj Anglaj tekstoj) k.t.p. (6), la doktoro respondis, ke malfeliĉe li ne povas (7) legi la notojn, sed pro la ciferoj komprenas (7), ke la aŭtoro pritraktas punktojn pri metriko. Kiam Zola forkuris (8) el Francujo dum la malfeliĉa afero pri Dreyfus, li tute ne povis kompreni (3) sin per la Angla lingvo. Tiel same estis ĉe (5) la Dana poeto Herman Bang, kiu mortis en mizero en Ameriko en la jaro mil-naŭ-dek-dua tute ne povante sciigi al la proksimuloj siajn plej ordinarnajn bezonojn.

Ne forestas ekzemploj de simila

reobleco ĉe (5) ŝtatestoj. Estas dirite (9), ke Danujo suferis malprofiton ĉe sia malfacila politika situacio en la mezo de la pasinta jarcento pro tio, ke Madvig, la fame konata latinisto, kaj aliaj ministroj nur malfacile povis paroli France kaj hezitadis paroli malĝustan Francan al la aliandaj ambasadoroj. Tiel same estas raportite (9) pri personoj de la tutmonda milito. Sir (10) Edward Grey ne povis paroli France, kaj la Franca ambasadoro, Cambon, malbone parolis Angle. Neniu el la Francaj kaj Anglaj generaloj, krom Lord (10) Kitchenĉer, bone parolis la lingvon de la alinacianoj, kaj en la Pac-Konferenco Clemenceau gajnis superan influon nur pro tio, ke li sola perfekte sciis ambaŭ lingvojn. Oni ne bezonas neordinaran saĝon por kompreni, ke konfidencaj interparoloj inter eminentaj ŝtatestoj el diversaj nacioj pri aferoj de tutmonda graveco perdas multe da profito, se tiaj interparoloj devas esti farataj pere de interpretistoj. Kiel multe pli bone estus, se ĉiuj grandcerbuloj povus egale bone kompreni ĉiu la aliajn, sed tio ne estus ebla krom se per la uzo de perfekte neŭtrala lingvo.

(daŭrigota)

NOTARO 11.

1. Preseraro. — Trad. 9, kol. 2, L17 "arboran (arbaron). — 2. "legadis," used to read. Cox 270 (1c). Vidu noton 4 malsupre. — 3. "komprnigi sin" povas laŭ la kunteksto signifi aŭ "igi sin kompreni" (aŭ komprenanta) aŭ (kiel ĉi tie) "igi sin komprenata." L.R. pĝ 31. — 4. "would" ĉi tie signifas "used to." Vidu noton 2 supre. — 5. "ĉe" ofte havas la senceon de "with" aŭ "in the case of," ekz.: Ŝia buŝeto tremis, kiel okazas ordinare ĉe la infanoj, kiam ili penas reteni fortan ploron. Mart. 143/27. — 6. Oni ne esperantigas nomojn de neinteraciaj societoj. Notaro 2/5. — 7. Rimarku "povas" ne "povis" kaj "komprenas" ne "komprenis." Notaro 2/15. — 8. Iuj verkistoj uzas la ankoraŭ neoficialigitan "fugi" (to flee). Zam. uzas "kuri" (Gen. xxxv, i). — 9 "Estas dirite" kp.: Mat. 5/21. Vidu ankaŭ "estas raportite" malsupre. — 10. Ne esperantigu la titolojn "Sir," "Lord," "Lady" kiam ili aperas kvazaŭ parto de persona nomo, sed oni dirus "ĉeestis multe da lordoj kaj lordinoj (peers and peeresses) kaj sinjoroj, inter kiuj estis Lord Curzon, Lady Blake kaj Sir James Smith." —

11. Kiam oni uzas la sufikson —ad en antaŭa verbo en frazo (kiel ĉi tie en "aŭskultadis") ofte ne estas necese uzi ĝin en posta verbo en la frazo, ĉar sen ĝi la senco estas tute klara. Kp.: F.K. 29/14.

KRONIKO.

MELBOURNE, Vict. — Inter la aferoj pri kiuj interesiĝas la Esperantistaro, du okazintaĵoj estis speciale notindaj. Je Feb. 28a, s-ro. C. W. Ballard, invitis la Esperantistojn al sia domo por ke ili aŭdu novajn fonografdiskojn, de Dro. Privat kaj aliaj parolantoj. Unu disko donis lecionon pri la elparolado de la lingvo, kaj pro tio la aŭskultantoj trovis ĝin la plej interesa. Dum la vespero la gastoj partoprenis en du ludkonkursoj, dum la diveno de kiuj la konkursoj tre gajigis. Por tre feliĉa vespero la gastoj esprimis al gesejoroj Ballard siajn dankojn.

Je 19a Marto, s-ro. C. L. Clarke faris bonan kaj interesan paroladon pri la multe uzata kaj bone konata poŝtmarko. Li priskribis ĝin de tempo de la unua eldono, kaj, pri la ŝanĝoj de formo, traborado, k.t.p. kiuj aperis kun postaj eldonoj, kaj pri kelkaj desegnoj li rakontis ridindajn anekdotojn. Li ankaŭ montris al la anoj orde aranĝitajn poŝtmarkojn en du albumoj, kaj por unu serio kiun li elmontris je ekspozicio oni aljuĝis al li bronzan medalon. La anoj kore dankis s-ro. Clarke kaj poste ekzamenis la poŝtmarkojn laŭvole.

HAMILTON, Nov-zelando. — Nova kurso sub la aŭspicioj de la loka Societo komencis post la Pasko. S-ro W. B. Williams, River Rd., estas la sekretario. N.Z. samideanoj povas mencii ties adreson al iuj geamikoj ĉi tieaj.

MASTERTON, N.Z. — La 18an Februaron nia grupo rekomencis agadon por la jaro kun 15 geanoj. Ĉe kunveno tre sukceso-plena, la jenaj oficejoj estis elektitaj: — Patrono, S-ro G. R. Sykes, Parlamentano; Prezidanto kaj Instruisto, S-ro A. Dewar; Vice-prezidanto, S-ino J. Mc-

Nab; Publikada Agento, S-ro E. J. Coleman; Komitatanoj, S-roj H. Franks and H. Arthur; Delegito al N.Z.E.A., S-ro A. Dewar. La grupsekreretario estas S-ino L. Payne (8 Bruce Street), kiun oni reelektis al la grava ofico. Raporto de la loka Y.M.C.A., kiuj laŭdis Esperanton kaj certigas la Grupon pri sia laŭpova helpo. Kunvena raporto aperis en nia taggazeto, kio publikis ankaŭ bonegan artikolon pri la opinio de Profesoro J. J. Findlay pri Esperanto.

WELLINGTON, N.Z. — Dum pasinta monato la ĉi tiea klubo regule daŭras siajn kunvenojn, ĉiu el kiuj havis bonegan programon laŭ ĉiavidepunkto. Krom elementa instruado por novuloj, programeroj altgradaj por spertuloj estis provizigitaj. Novaj membroj daŭras aliĝi. Ĉiu kunveno ricevas detalan presmencion.

Aferoj de la nove starigita N.Z. Esp. Associo antaŭeniras bone. La honora sekretario, (S-ro Wm. H. King, 119A Kelburn Parade, Wellington) raportas ke Kavaliro Georgo Fowlds, C.B.E., akceptis oficon de patrono; ke la agkomitato estas starigita; ke kluboj k.a., jam estis provizitaj kun detala konferencraporto; kaj ke cirkuler-leteroj estis enpŝtigitaj al la N.Z. Esperantistaro.

SYDNEY, N.S.W. — Dum Marto la Sidneja Esperanto Societo perdis sian tre entuziasman kaj kapablan prezidanton Dro. Williams. Tiu-ĉi bone-konata laboranto por nia afero forvojaĝis, la 26 de la monato, al Papua, kie li restos dum nedefinita tempo. Je la 21 de la monato li estis adiaŭta de malnovaj anoj de la Sidneja Esperantistaro, kaj prezentata per horloĝo. Multaj malnovaj anoj ceestis; inter ili S-ro. Simon, estinta prezidanto de la grupo. Ĉiuj deziras al li, bonŝancon en lia nova posteno!

En la sama vespero, S-ro. V. Roberts, de la Pac-Societo, (Peace Society), liveris paroladon kiu enhavis multon de intereso al ĉiuj, kiuj sin interesas pri Mondpaco kaj Frateco. La temo de la parolado estis, "La Pac-movado kaj Esperanto." La ĉefa punkto de la lekciejo, kiu estis en

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rezorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p
la adresun

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

angla lingvo, estis la emo al unueco en la nuntempa mondo. Ekzemple, diris la paroladanto, ni havas unuecon en la scienco, matematiko, muziko, radio; kaj komerco, turismo, k.t.p., pli kaj pli kondukas la mondon al unuecon en tiuj kaj similaj aferoj. En lingvaj aferoj ankoraŭ ekzistas haoso, sed, pro la supre menciita unuecemo, oni ĉie pli kaj pli sentas la bezonon de internacia lingvo. Sendube, iu ajn nacia lingvo ne povas servi kiel internacia lingvo, pro la malfacileco en la lernado de ili, kaj ankaŭ pro la nacia ĵaluzeco. Oni ankaŭ ne povas revivigi "mortintan lingvon," kiel la latinan pro la granda malfacileco en ilia lernado. Do, devas esti "arterfarita" lingvo, kiun oni elektos por internaciaj rilatoj. Komprenble, tiu internacia lingvo estos uzata nur por internaciaj aferoj, kaj ne celos tute forigi la naciajn lingvojn; tiuj ĉi ankoraŭ estos uzataj por enlandaj aferoj. Multaj penoj estis faritaj, enkonduki internacion help-lingvon tian, sed ĉiuj, krom Esperanto, malsukcesis, kaj preskaŭ malaperis. Nur Esperanto vivas, kaj sin montras kapabla plenumi ĉiujn postulojn de internacia lingvo.

Alia tre grava maniero en kiu labori por mond — paco, estis per edukado. Kiel oni emas al unuecon en tiom multaj aliaj aferoj, tiel, ankaŭ, oni devas enkonduki universalan sistemon de edukado. Se la infanoj en ĉiuj landoj estus edukataj kontraŭ la militon, milito baldaŭ forigus. Por unuigi la popolon, regantoj ofte parolas pri "la malamiko post la landlimo," kiu deziras invadi ĉies landon. Tio helpas kreskigi la milit-spiriton, dum, se ĉiu komprenus, ke popoloj de ĉiuj landoj estas homoj, similaj, unu al alia, milito multe malaperus.

El Richmond, N.S.W., venis raporto pri fondo de Esperanto grupo tie. La ĵurnalo, "Hawkesbury Herald" multe priskribis la aferon, kiu estis frukto de la laboro de Sro. G. Di Rago. La grupo formiĝis en Januaro, kaj la oficistoj elektitaj estis; Prezidanto, Sro. W. Hudson; kasisto, Sro. N. S. Marshall; sekretario, Sro. G. Di Rago. Sep-cola kolonero pri la lingvo, titolita, "Kial lerni Esperanton?" estis, publikigata de la "Hawkesbury Herald" kiun dankis la grupo.

DEZIRAS KORESPONDADI.

Emilo Chudoba, Stonavá, Silezio-Ĉ.S.R. Deziras korespondi pët. kël. per L, Pt bfl! Tuj Respondas!

NOVA GRAMATIKO (Stamatiadis).

Bedaŭrinde estas, ke d-ro Anakreoni Stamatiadis ne kartone bindigis ĉe iu jam konata firmo sian 186-paĝan lernilon por superaj kursoj. La broŝurita libro malfiksiĝas disfolie en la mano.

Ne nur pri gramatiko, vortfarado kaj sintakso ĉi tiu ampleksa libro pritraktas, sed ankaŭ pri instrumentadoj kaj plialtaj ekzamenoj por instruistoj, kaj ĝi klarigas la ĝisnune malfortan staton de Esperanto en Grekujo. S-roj Bailey, Lippman, Fruictier kaj Stojan kontrolis la manuskribajon, kaj pro tio oni miras, ke unu-du dubaj formoj enigis en la tekston.

Ĉiu paĝo instige havas rilatan demandfrazaron ĉepiede. La libro, kvankam tre multhava, tamen por kelkaj restos ankoraŭ nesufiĉe kompleta. La atendemo jen-jen ricevas skueton, ĉar oni volas pli scii pri multo nepre inda esti trovata en tia verko. Ekz., la pritrakto pri la nombroj de akordigantaj substantivoj kaj adjektivoj (10) povus esti pli prinita; la uzo de la adjektivo ĉe senobjekta frazo (12), (kial d-ro S. ne tuŝis pri Dan. 4/2 kaj Petro 1/13?); ĉu vere laŭ Lippman "tia formo estas antikviginta kaj tial nekonsilinda"? Ŝajne la rimarko en 12/41 devis esti presita en linio antaŭ "Aliaj ekzemploj." Oni ŝatus iom detalan pritrakton pri la nuancoj de la verbfinaĵo post "kvazaŭ" (65,77). Ekz., "Li iris kvazaŭ li esis (us) ebria." "Unuobla" (obligas de unu?) kaj "duobla" estas kuriozaj almenaŭ por Angloj pro ilia signifo donita al "double." Kp. Mill.

"Forludi sian unikan panon" (27) estas neĝusta. Ĉu ne "solan, lastan, sole reŝtantan"? Post "ĉiuj" la artikolon ne uzas bonaj verkistoj. Vere antikviginta estas la citaĵo en la Dua Libro, pĝ 39, "ĉiuj la Dioj." La cito de alia verbfinaĵo (38) al "u" post "por ke" ankaŭ estas interesa arkalkaĵo sed tute ne imitinda. Ni estu simpla, precipe ĉe la verboj. Ne fikreskiĝu al nia lingvo la nacilingvaj malregulaĵoj.

En pĝ 23, par. 85 la vortoj "En ĉiuj aliaj okazoj oni uzas 'vi'" povas esti erariga, ĉar oni povus supozi, ke "ci" estas deviga en la antaŭiranta frazo.

Lumiga estas mallonga letero de Zam. pri la vortoj "pi" (66), "feliĉi." Kvankam Zam. iom ofte uzis

akuzativon post "kontraŭ" (24), neniam li faris tion post "ĉe." La konsilo de d-ro S. ne uzi du sinsekvajn prepoziciojn (74) estas pridiskutinda pro la jamofta ekzemplo de la Majstro, kiu ankaŭ uzis "depost" unuvorte; malgraŭ tio, estas prava la averto de S. pri la malfacilo fonetika (74). "Citato" (citaĵo) 83.

Ĉe 86 troviĝas paragrafo atentinda por ĉiu trokunmetulo. Ne ĉiu por la verkanto tutklara kombinvorto estas nepre unusenca por aliulo. Kp. Butontro—troo sur la vesto, tra kiu oni pasigas butonon; troo de butono—troo sur la butono mem.

93. D-ro S. malrekondas uzon de "end" ĝis ĝia oficiala aprobo. Ĉu ne pli konsilinde uzi ĝin libere ĉe la literaturo, sed rifuzi al ĝi lokon en lernolibroj kaj parolo? 105. Ĉe "dank'al Dio" la apostrofo verŝajne estas neregula sed ofta forlaso de "on," ne "o." Tamen komparu Ham. 1. 1. "Halt" (halt-u), . . kiu iras? Dank' al" povas ankaŭ servi kiel "danke al." Kp. "ruĝ" aŭ nigre binditaj." (Privat)

Pri la t.n. listo de 'homonimoj' oni povus diri, ke la kompilinto tro streĉis la spriton. Estas aserteble senriske, ke neniam okazos ia malkompreno pri cim-balo, cir-kulero, diabeto, fal-balo, kol-porti, mani-pulo, vet-er-in-ar-o (kolekto da inaj elementoj de veto!). Strange ke la verajn homonimojn li preterlasis. (Vidu nekompletan liston alikolumne).

110. Kial "ekvivalas" anstataŭ la Zam. "ekvivalent"?

127. En la frazo "partikuloj devas stari ĵus antaŭ la verbo," la aŭtoro strange uzas "ĵus" kiel adverbon de loko.

132. "fineco" (finesse), subtileco, lerteco, delikateco, estas dusenca. Kial ne prefere "finezo"? 155. 30. Erara uzo de "kies" (kiun).

Bone estus, ke d-ro S. precizigu la difinon de la vortoj Heleno, nov-Heleno, Greko, por ke ili ne staru kiel nenecesaj variantoj en la penso de la negreko.

Ŝtudinda libro, precipe por Grekoj, kiuj povas kompreni la sendube ĝustajn komparojn, ĝi nepre markas etapon sur la malfacila marŝovojo de nia Greka samstelanaro. Prezo 8/6. (Robo).

Adresu ĉian komunikadon por la Suda Kruco al "La Administranto" Box 731f, Elizabeth St. P.O. Melbourne, Victoria.

AN ACTIVE BODY.

Christchurch (N.Z.) Esperanto Society.

The above-mentioned Society — properly organised — commenced the new year on the evening of 12th February, 1929.

In 1928, an average of five or six members attended the fortnightly classes which were instructed by Mr. N. M. Bell, M.A., B.D., D.B.E.A., who, although an extremely busy man, very kindly gives his services to the cause of promoting Esperanto in Christchurch, and is doing splendid work. Last year, the classes commenced at 8.30 o'clock every second Thursday evening and continued until 10 o'clock. Each pupil had a "Fryer's" textbook and a pocket dictionary. Much work was put into the translating of Esperanto into English and vice versa; also during several evenings, books were put aside and conversation in Esperanto made the evenings full of enjoyment. In addition to the instruction given, the Society maintained a regular six-weekly radio lecture from the local station (3YA) and secured the publication in a leading daily of a series of splendid Esperanto articles of a highly informative nature. This year, the Society intends to undertake a great deal of work in various fields, and by way of making a start, officers were appointed as follows and a policy was discussed:—President, Mr. N. M. Bell; Librarians, Miss Corkill and Mr. G. E. Wheeler; Philatelist, Miss Moffatt; Treasurer and Secretary, Mr. A. More (48 Hackthorne Road, Cashmere Hills, Christchurch).

The members who attended the classes last year have agreed to take each a new member and coach that member in the primary grammar of the language and so attain quicker results for the Society. It was decided that the Society have a small seal to attach to correspondence and a design—one of several submitted by a member—was chosen. A monthly report will continue to be sent to the Suda Kruco for publication. A subscription of six pence for each member will be handed to the secretary each evening of meeting of the Society, the money to be used for literature for a library, advertising which the members agree is necessary, and also for a reserve fund to meet any expenses incurred during the attend-

ance of any chosen delegate at any conference held by the N.Z.E.A.

The meetings of the Society are to be held during this year every second Tuesday evening at 8.30 o'clock, and on the opening night ten members attended, several others notifying their intention of joining later.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Arbeider-Esperantisten, 10-12; Antaŭen, Jan.; Arbeiter-Esperantist, 2; British Esperantist, 287; Bulgara Esperantisto, 5; Belga Esperantisto, 10-11; Esperanto, 2; Esperanto et commerce, Jan.; Germana Esperantisto, 2; Heroldo de Esperanto, 3, 5; Hungara Heroldo, 1; Internacia Esperanto-Servo, 8-10, 11-12; International Language, Feb.; La Revuo Orienta, 2; La Progreso, 5-6; Oomoto Internacia, 26; Svenska-Tidningen, La Espero, 2.

ESPERANTO IN SOUTH AMERICA

The Esperanto movement in South America is once more attaining the dimensions that it had before the war. National associations for the propagation of the language have been formed in Peru and Paraguay. A national society is in course of formation in Chili. The Brazilian Esperantist League has for years past been in the front rank of the movement on the other side of the Ocean.

The great French architect, Agache, who has been visiting Brazil, has delivered a number of lectures on town planning in Esperanto to large audiences.

—I.E.S.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata) A. Bennett, 4/6, Okt. '29; K. Simmons, 20/-, Junio '33; C. J. Adcock, 5/-, Marto '30; H. C. McKerrow, 4/-, Feb. '30; S-ino McNab, 5/-, Dec. '29; S-ro Johns, 5/-, Dec. '29; J. McGuigan, 5/-, Aprilo '29; W. McGuigan, 5/-, Julio '29.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin . . (Cox) . . Paper . . . 6d.
Aŭstralio, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio . . . 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

Dancu Marionetoj (Baghy) . . . 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth . . . 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.